# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto, n-ro 2
februaro 1987

## ATENTINDAJOJ

14 03 1987 : ekde 10.00 h. estrarkunsido

ekde 13.30 h. ĝenerala jarkunsido de FEL

laŭ tiu ĉi vojo, ĉiuj membroj de FEL estas invitataj al la ĝenerala jarkunsido. La grupestroj bonvolu averti siajn klubajn gemembrojn kaj inviti ilin.

La programo estas la kutima : ĝenerala raportado de la diversaj laborgrupoj / komisionoj, grupoj, ĝenerala sekretario k.s.
Poste la ĉiujara estrar- kaj administrantar-kunmeto/elekto kaj posta debato pri la estonta agado.
Fine, kiel kutime : agrabla kunestado.

21 03 1987 : Jubileo de PACO KAJ JUSTECO en Bruĝo.

Info : Fernand Roose.

**Informilo,** kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. • Jarabono: 150 fr. • Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 • Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel.

## E S T R A R O kaj L A B O R G R U P O J

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Meidoorn 42/2, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN

Roland ROTSAERT ( estrarano) 050/33 00 04
Visspaanstraar 97, 8000 BRUGGE
050/33 00 04

Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO GAZETARA SERVO
Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Marc VAN DEN BEMPT 016/20 14
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN 011/32 36 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO
Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN

Rilatoj kun FLEJA : Hilde VANINGELGEM.



## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de 1987 02 14 en Antverpeno

Ĉeestas: Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Roland Rotsaert (RR), Paul Peeraerts (PP) kaj Edward Symoens (ES).
Petis senkulpigon: Jan Bovendeerd.
Prezidas: ID
Protokolas: PP

1. La protokolo de la antaŭa kunsido estas akceptita.

2. Financoj
2.1 PP klarigas, ke la jaro 1986 donis malgrandan gajnon, malgraŭ niaj grandaj investoj. La estraranoj hejme funde pristudu la financan rezulton. PP
2.2 Eldonoj (Stafeto):
Montriĝas ke tria libro povos esti baldaŭ preta: "Sub la signo de socia muzo" sub redakto de William Auld. Se necesus liberigi likidan monon por povi eldoni tri librojn en mallonga tempo, PP pensu i.a. pri kasa kredito.
Kiel miksaĵo: la libro estas nun bindata.
2.3 Sonorilo:
Tiu ĉi libroservo pli kaj pli eklaboras por si mem kaj damaĝas al la Esperanto-movado. FEL protestis al Sonorilo-estrarano Maertens. Tiu ĉi kunvokos la estraron de Sonorilo kun la celo malpermesi al Patrick kaj Monique de Schepper transiri la statutajn celojn de Sonorilo.
ID regule informiĝos ĉe Maertens pri la rezultoj de tiu estrarkunsido. ID
2.4 Esperanto-Panorama:
PP verku artikoleton pri la nova biblioteko, pri la grandiĝo de la libraro en Kortrijk. PP
2.5 Ĝemeliĝoj:
La landaj asocioj de Okcidenteŭropo proponis, ke ĉiu asocio ĝemeliĝu kun afrika landa asocio. La estraro proponas ĝemeliĝi kun Ruando. ID skribos al Wim de Smet por peti iliajn konkretajn bezonojn.
2.6 Peraco de revuoj:
PP petas, ke ni reklamu tiun servon, sed kun la jenaj klarigoj: PP

PP

3. Kunordigo
3.1 Patrona komitato:
ID faros novan aktualan liston kaj havigos 30on da ekzempleroj al ES. ID
3.2 Germain Pirlot proponas inviti jarfine tiujn ĵurnalistojn kiuj en 1987 favore raportis. FEL regalus ilin kaj donacus samtempe superrigardon pri la atingoj dum la jubilea jaro. estr. 87-88
3.3 FEL proponos al BEFO ke ili sugestu al la redakcio de Inter-Rail publikigi artikolon pri Pasporta Servo. ID
3.4 El lastatempa jura decido montriĝas, ke estraro de a.s.b.l. ne rajtas eldoni sian subskribrajton al sia direktoro, eĉ ne se la decidoj estas publikigitaj en la protokolo. Du estraranoj persone subskribu ĉiujn aktojn kiuj ligas la

asocion.

3.5 FEL ricevis peton, ke ĝi deklaru sin kontraŭ nuklea energio. Ĉar tiu ĉi propono ne kongruas kun la asocia celo, la estraro opinias, ke ĝi ne povas fari deklaron sen la konsento de la membroj. Same validas por petita deklaro kontraŭ fumado.

3.6 Jarkunsido:
La estraro petas al ĉiuj grupoj prepari mallongan paroladeton maksimume kvinminutan pri siaj atingoj kaj malatingoj en 1986. Dum la jarkunsido funkciu libroservo en la nova biblioteko.
JB petas ke oni deklaru vaka la postenon de helpsekretario. Ĉar li mem ne plu sukcesas mastri sian funkcion de sekretario.
Oni honorigos Louis Janssens pro liaj sukcesaj streboj enkonduki programojn pri Esperanto en BRT.

4. Informado

4.1 Lingvoborso:
ES telefonos al s-ro van Damme kaj petos ĉu la Brusela grupo denove organizos standon en la lingvoborso. Se jes, ES insistu ke oni uzu kiel nederlandlingvan materialon nur la modernajn flugfoliojn de FEL. La ekspozicio de FEL ne jam estas preta, sed se s-ro van Damme ŝatus havi ĝin, ni provos pretigi ĝin ĝis tiam.
FEL pagos duonon de la kostoj de la stando, havigos senpagan informmaterialon kaj, se eble, senpagan ekspozicion. Nura kondiĉo estas, ke en la borso aĉeteblas ankaŭ nia kurso Esperanto-Programita.
PP sendos al s-ro van Damme ekzemplerojn de nia varbmaterialo. PP
Se necese, la Brusela grupo povas ankaŭ mendi la saman materialon en la franca lingvo, kontraŭ kostoprezo.

4.2 Glumarkoj
FEL eldonis glumarkojn kun la jubilea simbolo. Iom grandaj kvantoj estos venditaj kontraŭ kostoprezo , t.e. 0.60 fr. por la malgrandaj, 6 fr. por la grandaj.

4.3 Kontaktoj
ID havis kontaktojn kun VTB kaj kun Bond zonder Naam (ĉefsidejo). VTB promesis aperigi artikolon pri Esperanto. Bond zonder Naam volas diskonigi la eblecon ke iu de FEL prelegu aŭ instruu en lernejoj. Alex Humet estas preta fari la prelegojn. FEL pagos al li 500 fr. por liaj kostoj se li prelegas enprovince, 1000 fr. se PP
eksterprovince, plus vojaĝkostojn. GJ

4.4 Poligloto de Belgio
FEL donacos al li Esperanto-kurson. RR kunportos ĝin tuj por livero, kune kun afabla letereto. RR

4.5 Lernalkroĉilo
Sentiĝas la bezono havi en la librobutikoj ankaŭ malgrandan malmultekostan libreton kiu donas ideon pri la lingvo Esperanto.
ID unue sondos ĉe Spectrum ĉu ili volas disvendi ion tian. ID

5. Diversaĵoj

5.1 Denove leviĝas la problemo pri diplomo pri instrua kapablo. Ekz. en Svislando la landa asocio malrekomendas al siaj lokaj organizaĵoj uzi la servojn de instruistoj kiuj ne havas la necesan diplomon. La punkto revenu sur la tagordo de la JB
venonta kunsido. ID

5.2 Okazos 40minuta programo en BRT-3 pri Esperanto. BRT petas ke ni zorgu pri ĉ. 5 personoj. ID zorgos pri tio. ID

5.3 La 28an de junio okazos Eŭropa Tago en la Jubilparko en Brugo. Ne estus malbone se niaj membroj ĉeestu tie por ekhavi spertojn kaj kontaktojn. RR havigos pli da detaloj. RR

5.4 Vojaĝo al Varsovio.
La aliĝilo estas preta. Estas sufiĉe da interesitoj, kiuj ĉiuj ricevos la necesajn kontaktojn.



*La interhomaj rilatoj en FEL XI*

TEMPO PROGRAMITA.
=================

*La granda diferenco inter infano kaj plenkreskulo estas la deziro de plenkreskulo por strukturi la tempon. Malgranda infano ne planas sian tagon, ne scias je la 10a horo, kion ĝi faros je la 10h01. Nia Natura Infano ankaŭ ne sentas la bezonon. Ĝuste tio donas la feliĉigan etoson al ferio: leviĝi, kiam ni spontanee vekiĝas, kaj agi laŭ la inspiro de la momento. Foje plenkreskulo devas lasi spacon al sia Natura Infano. Sed pensiumito, kiu ne havas programon, eble ĝuos sian novan vivon dum kelkaj tagoj nur. Poste sekvas enuo. Ni ne plu povas vivi sen programita tempodivido. Tion ni supozeble dankas al la influo de nia Gepatro. Nia Plenkreskulo povas zorgi por bona ekvilibro. Tiu, kiu nur hastas, fariĝas nervmalsana. Tiu, kiu nenion planas, sentas sin perdita, senutila en la socio kaj enuas. Tiu ekvilibro ankaŭ gravas por ĉiuj niaj Esperanto-aktivecoj: Esperanto-kongreso sen programo povus esti enua. Tro densa programo nervozigas la ĉeestantojn. La malbono en nia nuntempa socio estas ĝenerale la troa ŝtreĉiĝo pro niaj devoj.*

*Tion ni povas malhelpi facile per konscia ŝanĝiĝo de la Gepatra premo. La gepatroj kaj edukistoj ĝenerale pelis nin en la infanaĝo La peliloj estis "Estu perfekta!" "Faru vian eblon!" "Rapidu!" "Estu saĝa!" "Estu forta!" Tio donis al ni la impreson: "Vi ne estas en ordo (E.O.), kiel ni gepatroj" Por kompensi tion, ni komencas psikologiajn ludojn, kiuj donas al ni momentan malpezigon: "Nun, mi estas E.O., kaj vi ne ĉar mi venkis vin en la ludo". Sed tio estas nur momenta kontentigo. Poste ni refalas en la senton "Mi ne estas E.O., mi venkis la aliajn en la ludo, ili ne estas E.O-j; kia malfeliĉa mondo, ĉio estas en malbona stato, ni vidas nur mizeron kaj malbonaĵojn; mi perdas la kuraĝon!"*

*Se ni bone konsciiĝas pri tiuj internaj, Gepatraj voĉoj, kiuj senĉese pelas nin, ni povas ŝanĝi tiujn pelilojn en permesojn: "Provu por fari la aferojn bonaj" "Faru vian eblon, se vi deziras tion" " Rapidu, se vi deziras rapidi" "Faru ion plaĉan al aliaj, se tio plaĉas ankaŭ al vi" "Provu esti forta por efektivigi kion vi deziras". Tio donas senton "Mi estas E.O.; mi sukcesis en miaj planoj, kaj la aliaj estas E.O., ĉar ili permesis miajn agojn, eble helpis, aprezis, apogis min!". La Natura Infano havas eblecon por manifesti sian kreivecon. Ni ofte krios "Hura! La sistemo kiun mi malkovris per T.A. funkcias!"*

*Ivo Durwael*

# P R O T O K O L O

pri la Ĝenerala FLEJA-Jarkunveno de sabato 21-a de februaro en Leuven okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

---

Komenca horo : 10.00 h.

Ĉeestantoj : Carl Deseure, Françoise Guldentops, Patrick Haerick, Andre Ruyssachaert, Ite Tytgat, Kiki Tytgat, Wim Tytgat, Vera Van Boxel, Jean Pierre VandenDaele kaj poste Eddy Van den Bosch.

## T A G O R D O

1. Enkonduko :

Gvidantoj : Kiki kaj Wim Tytgat.
Protokolanto : Jean Pierre VandenDaele
Trarigardo de la antaŭa protokolo, samtempe agado dum 1986

2. Financoj (Ite) :

Pro persona kialo (gravedeco) kaj ne alveno de la finkalkulo de nia semajnfino en Overpelt, ŝi ne povas prezenti la financan raporton. Ĝi estos sendita al la estraranoj la sekvontajn semajnojn. La finkalkulo de la IJK en Loveno alportas 3.000 guldenojn al nia UEA-konto.

3. JEN/KONCIZE (Jean Pierre/Patrcik)

3.1. La nova ĉefredaktoro nun estas Hiddo Velsinck. La lasta numero presota en GCA estos la marta/aprila je 27/2, faldota je 8/3.
Limdatoj (por sendado de viaj kontribuaĵoj al Patrick) por la sekvontaj numeroj (presotaj kaj ekspeddotaj en Nederlando) estos 15/4, 17/7, 12/8, 14/10 kaj 9/12.

Ĉar Françoise kaj Carl devis foriri, la trarigardo de la antaŭa protokolo interrompiĝis kaj okazis la elekto de la nova estraro (vd poste)

3.2. Reagis entute nur 3 personoj al la anonceto aperinta en JE.. por [illegible]vi dum unu jaro senpage KONCIZO-n. Ĉar tio apenaŭ valoras la penon, [illegible]EJA mem elektos personojn (20-o da) kiuj ricevos ĝin senpage dum 1987. Same kelkaj personoj ricevos TEJO-Tutmonde-n.

4. Diversaĵoj.

4.1. Interŝanĝoj :

Povas senpage partopreni 3 FLEJA-anoj dum 10 tagoj al la pupteatra renkontiĝo en Zagrebo je 2-9/8/87 kun temo : 100 jaroj da Esperanto-kulturo. Nur pagendaj estas la vojaĝkostoj. Informoj ĉe Kiki.

4.2. Skipromena semajnfino

Intertempe ĝi okazis kaj denove estas planata dum semajnfino en marto.



Merite ĝin aranĝos Marie Grela.

5. 10-a jubilea FLEJA-kongreso (Patrick)

Ĝi okazos je 30/10 - 01/11/87.
La kunordiga teamo konsistas el Katrien, Mari-Roza, Françcoise kaj Patrick. Ili trovis taŭgan ejon en Waasmunster. Tamen memkuirado ne estas akceptata kaj apenaŭ eblos gajni en la vendado de trinkaĵoj. Ni jes provos prizorgi manĝetaĵojn dum la celebra vespero. La kostprezo por la loĝejo (inkluzive asekuron kaj hejtadon) sumiĝas je po BF 900,-. La kongresloko estas akceptita. Sugestoj por temo estas bonvenaj.

6. Elektoj (prezidas Wim)

6.1. Estraro

Ite eksiĝis kaj Wim rezignis pri prezidanteco.
Prezidanto : Andre Ruyssachaert
Kasisto : Wim Tytgat
Sekretario, rilatoj kun FEL : Jean Pierre VandenDaele.
Kongresoj/redaktoro JEN/KONCIZE : Patrick Haerick.

6.2. Taskitoj

TEJO-komitatanoj : Andre Ruyssachert kaj Ilse Jacques (anstataŭantoj estu mem indikataj je nepartopreno al la IJK).

Reprezentantoj en la lokaj grupoj (por aktivecoj kaj agadoj)
Aalst : Mari-Roza De Wolf
Antwerpen : Dirk Deweerdt
Gent: Patrick Haerick
Leuven : Carl Deseure
Aliaj grupoj : vakas

Revizoro ne estas elektita.
Andre trastudos niajn statutojn aperintajn en antaŭaj ŝtatĵurnaloj cele al ŝanĝo aktualigita.
Wim deponos nian membroliston ĉe la aktuarejo de la ĉeftribunalo, komence de majo.

7. Estrarkunvenoj :

Venontaj estrarkunvenoj malfermaj okazos je
- 21/3 post la akademia kunsido de PACO KAJ JUSTECO en Bruĝo.
- 23/5 antaŭ la serĉpromenado en Gent.

Fino : 12.30

Uzitaj mallongigoj : FLEJA : Flandra Esperantista Junulara Asoscio

GCA : Grafika Centro de Antverpeno

IJK : Internacia Junulara Kongreso

JEN : Jongeren Asperanto-Nieuws

TEJO : Tutmonda Esperantista Junulara Asocio

UEA : Universala Esperanto Asocio.

---